

Esperanto-vivo en Svislando, 2-a parto
Informado
Claude Gacond, 391-a radioprelego, 1971.04.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Enketo, kiun ni faris dum la lastaj jaroj, alportis al ni la certecon, ke en Svislando minimume cent personoj lernas esperanton ĉiujare.

Cl.- Ni estis kondukitaj al tiu minimuma nombro per la nombro de la venditaj lernolibroj, per la nombro de la kursoj publikaj aŭ privataj, per la nombro de la informpetoj, kiujn ni ricevadas.

A.- Tiu enketo pruvis, ke bedaŭrinde nur tre malmultaj el tiuj novuloj aliĝas al la svisa aŭ al la lokaj societoj. Eble 4 aŭ 5 el tiuj cent novuloj aperis sur la membrolistoj de la svisa societo kaj 10 aŭ 15 en la adresaroj de la lokaj societoj.

Cl.- Niaj kontaktoj kun la novuloj kondukis nin al la certeco, ke tiuj malaltaj rezultoj havas kaŭzon.

A.- Ŝajnas, ke estas ĝenerala manko flanke de la priesperanta informado. Montriĝis, ke tro ofte la esperantistoj estas bonaj propagandistoj, sed malbonaj informantoj. Per tio ni volas diri, ke la esperantistoj estas troigemuloj, kiuj propagandcele lumigas la plej favorajn faktojn kaj silentas pri la nesolvitaj problemoj. Fakte ili propagandcele trompas la gelernantojn. Ili kredigas, ke en Svislando ĉio glate funkcias : la svisa societo kiel la lokaj kaj fakaj societoj.

Cl.- Montriĝis, ke informado devus esti preferata al propagando. Tiu informado devus raporti pri la faktoj sen ŝanĝi ilin. Ĝi devus doni ekzaktajn nombrojn, eĉ se ili ne estas tre altaj. Ĝi devus klarigi, kiel naskiĝis la internacia lingvo, kiel ĝi disvolviĝis, kiujn problemojn ĝi renkontis, kion nun devus solvi la esperantistoj. Ĝi devus diri, kion oni povas fari helpe de esperanto, kaj kion oni ankoraŭ ne povas fari.

A.- En 1970 Kultura Centro Esperantista redaktis kaj eksperimentis du specojn de informiloj. Unue informilon, kiun oni povas disdoni okaze de agadoj. Tiu multobligita folio alportas ĝeneralajn informojn pri la nuna stato de la esperanto-movado. Ĝi donas la adresojn de Kultura Centro Esperantista kaj promesas dokumentaron pri esperanto al la informpetantoj.

Cl.- Dum la jaro 1970 ni disdonis plurajn milojn de tiu francelingva informfolio. Ni povis kalkuli, ke proksimume 10 procentoj el la ricevintoj petas la dokumentaron, kiu konsistas el koverto enhavanta novan tekston pri esperanto kaj kelkajn dokumentojn : du numerojn de la revuo *Svisa Espero*, kelkajn prospektojn turismajn aŭ komercajn, la unuan lecionon de perkoresponda programita kurso, kiun ni nun redaktas.

A.- La pasintan jaron ni havis la okazon dissendi pli ol 800 tiajn dokumentarojn al informpetintoj.

Cl.- Ni povis konstati, ke proksimume la kvarono de la petintoj eklernas esperanton. Kelkaj tion tuj faras. Aliaj atendas monatojn, antaŭ ol ekagi.

A.- Ni ankaŭ konstatis, ke personoj, kiuj ne lernas, ofte informas aliajn personojn pri la nuna stato de esperanto. Ekzemple instruistoj donis informlecionon al siaj gelernantoj. Ni sciis pri tio, ĉar ili petis informfoliojn por la liceanoj.

Cl.- Fine de la pasinta jaro ni ĉesigis tiun kampanjon, kiu estis por ni provo. Kaj ni komencis reverki pli taŭgajn informilojn, tio ĉi en la tri ĉefaj lingvoj de Svislando. Tiu verkado, tradukado kaj multobligado estas longa kaj multekosta laboro. Ni antaŭvidas, ke en aŭtuno

Esperanto-vivo en Svislando, 2-a parto

Informado

Claude Gacond, 391-a radioprelego, 1971.04.07 & 10

1971 ĉio estos preta por nova kampanjo, kiun ni povos organizi ne nur en franca Svislando, sed en la tuta lando.

A.- Ĉiam en franca Svislando ni eksperimentis alian informan agadon. Al tri gazetoj, kiuj sin deklaris pretaj malfermi kaj pagi esperanto-kronikon, ni sendis aron da artikoloj.

Cl.- En ili ni ne rakontis, kio estas esperanto, sed kiel oni povas uzi esperanton. Ni konsideris, ke la legantoj estas homoj informitaj, ke ili scias, ke esperanto estas lingvo, kaj ne legomo, instrumento, floro aŭ frukto. Ni rakontis, kion la esperantistoj faras per sia lingvo internacia.

A.- Hodiaŭ ni donos kelkajn informojn pri artikolaro, kiu aperis en la gravega semajna gazeto *Coopération* [kooporado], kiun ricevas la duono de la familioj en franca Svislando.

Cl.- En tiu gazeto ni malfermis rubrikon sub la titolo *L'essor de l'espéranto* [La disvolviĝo de esperanto].

A.- Jen pri kio ni raportis en tiu rubriko.

Cl.- Ni rakontis, ke por infanoj esperanto estas hejma lingvo. Ni parolis pri la laboro de Kultura Centro Esperantista, kio donis al ni la eblecon aperigi ĝian adreson por la ricevado de informado. Ni memorigis, ke la granda ĝeneva lingvisto Ferdinand de Saussure interesiĝis pri esperanto, ni memorigis, ke UEA estis fondita en Ĝenevo de la filo de la granda pentristo Ferdinand Hodler kaj donis kelkajn ciferojn pri tiu asocio.

A.- En artikolo titolita *Et si nous allions à Keskémet ?* [Kaj se ni irus al Keskémet?] ni montris la diferencon inter turismo kun aŭ sen esperanto. Tiu artikolo vekis multajn demandojn. Al ili ni respondis en nova artikolo, kie ni ree anoncis dokumentaron. Poste ni klarigis, kial esperanto ne dialektiĝas, kie ĝi estas plej disvastiĝinta, ktp.

Cl.- Per tiu informado ni tuŝis milojn da gelegantoj. Alvenis tiom da informpetoj, ke ni decidis ĉesigi tiun unuan agadon, ĝis kiam ni estos reorganizintaj nian laboron.

A.- Tuj kiam nia dokumentaro en la tri ĉefaj lingvoj de Svislando estos preta, tiam ni rekomencos tiun kampanjon pere de franclingvaj, germanlingvaj kaj itallingvaj semajnaj gazetoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-